# Informilo

Monata revuo
Maandelijks tijdschrift

9a jarkolekto n-ro 5
majo 1989

## Estraro

Monique Caestecker, prezidanto, Kerkstraat 66, 9940 Sleidinge, ☎ (091) 57 63 84.

Edward Symoens, vicprezidanto, Putsesteenweg 131A, 2180 Kalmthout, ☎ (03) 666 62 66.

Ivo Durwael, sekretario, Paul Gilsonlaan 5, 2520 Edegem, ☎ (03) 440 30 92.

Roland Rotsaert, financoj, Visspaanstraat 97, 8000 Brugge, ☎ (050) 33 00 04.

Alex Humet, instruado, van Campenhoutstraat 4, 2600 Berchem, ☎ (03) 239 21 69.

Jos Vandebergh, eksteraj rilatoj, Ambachtstraat 39, 3538 Houthalen, ☎ (011) 52 19 43.

## Komisiitoj

*Financoj:* Roland Rotsaert, Ivo Durwael kaj Paul Peeraerts.

*Eldonoj:* Alex Humet, Paul Peeraerts kaj Chris Declerck (Amerikalei 135/2, 2000 Antwerpen)

*Manlibro de la aktivulo:* Marc vanden Bempt (Duisburgsestraat 12, 3030 Heverlee, ☎ (016) 20 14 53.

*Gazetara servo:* Guido van Damme (FEL, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen, ☎ (03) 234 34 00).

*Rebata servo:* Germain Pirlot (Kemmelbergstraat 5/3, 8400 Oostende, ☎ (059) 70 87 00).

*Turisma servo:* Ivona Kosieba, Gen. Drubbelstraat 105, 2600 Antwerpen, ☎ (03) 218 63 76.

---

FEL 10/6
brief Bell, ...
→ contakten ... behouden

## ESPERANTO-RONDOJ

### REGULOJ

1. Iu ajn membro povas ekiniciati Esperanto-rondon post informado kaj aprobo de la FEL-estraro. La FEL-estraro atentos ĉu la rondo estas preta por atingi sian celon (ekzemple, al konversacia rondo apartenu nur homoj kiuj finis bazan Esperanto-kurson.)

2. Esperanto-rondo konsistu el membroj de FEL (kaj sekve de lokaj grupoj). Esperanto-rondo ne signifas apartan grupon : la grupoj daŭre ricevos la parton de la membrokotizoj, ktp. Oni konsideru ĝin kiel aldona kompletigo de la grupa agado. Sed membroj de diversaj kluboj povas formi unu rondon.

3. La iniciatinto devas mem klare difini la celon de sia rondo. Kelkaj eblecoj : konversacia rondo, perfektigo de la lingvo, metodiko de kursoj, esperanto-logio, gazetara aŭ rebata agado, propagando, tradukado, librokomentado, interŝanĝoj de spertoj per Esperanto, gastigado de eksterlandanoj, korespondado, kontaktoj kun Afriko, ...
La speciala rolo de la iniciatinto finiĝas post la starto de la rondo.

4. La rondo konsistu el 3 ĝis 10 personoj. Se la rondo kreskas, oni formu eventuale duan rondon.

5. Ĉiu partoprenanto de la rondo promesu aktivan partoprenon al la celo de la rondo. Iu kiu ne havas sufiĉe da tempo prefere rezignu. Por ĉiu kunveno oni kune fiksu "agendon". Ĉiu laŭvice gvidu la rondon.

6. La rondo estu "fermita". La iniciatinto serĉas homojn kiuj volas komenci rondon. Posta aldono de plia membro eblas nur post aprobo de la aliaj partoprenantoj.



Ĉiuj partoprenantoj estas egalrajtaj.
La eventualaj kostoj estas dividitaj inter la partoprenantoj.
Se iu regule malatentas la regulojn, oni prefere - post komuna decido - eksigu lin aŭ ŝin.

7. Unu partoprenanto de la rondo raportu unu fojon en la jaro al FEL (prefere antaŭ la jarkunsido) pri la farto de la rondo.

8. Ĉiu rondano subskribu la supre menciitajn regulojn.

### KONSILOJ

- Ĉiu laŭvice gvidu la rondon. La gvidado celas eviti troajn deflankiĝojn de la tagordo.

- Oni kune decidas pri la datoj kaj loko de kunvenoj, prefere unu fojon en la monato. Tiu kiu estas malhelpata, sciigu tion al alia rondano.

- La gvidanto de la kunveno notu dum la kunveno la faritajn promesojn.

- La Esperanto-centro helpos kaj apogos la fondon de la rondo per disponigo de siaj servoj laŭ siaj eblecoj, ekz. uzo de la biblioteko, liverado de adreslistoj laŭ difinitaj kriterioj, ekspozicio, retroprojekciilo, informa materialo, ĝeneralaj movadaj informoj, uzado de Esperanto Panorama por anoncoj, ...

PROTOKOLO PRI LA STUDOTAGO PRI GRUPA AGADO EN LA ESPERANTO-CENTRO ANTVERPENO JE LA 20A DE MAJO 1989

Ĉeestis : Marc Vanden Bempt, Bert Vanhoren, Carl Deseure (Esperanto 2000/Leuven); Mathieu Habex, Hendrika Mandervelt (Genk); Marcel Aerts (Hasselt); Renée Ost (Halle); René De Clerck (La Erikejo/Kalmthout); Ivo Durwael (La Verda Stelo/Antwerpen); Monique Caestecker (La Progreso/Gent).

ID situas la kialojn por nova formo de grupiĝo : la Esperanto-rondoj.
- En multaj lokoj troviĝas nur kelkaj Esperantistoj kiuj ja ŝatas fari ion per/por Esperanto, sed la nombro estas tro malgranda por formi lokan grupon. Malgrandaj grupoj kun nur kelkaj Esperantistoj vivas sufiĉe izolitaj kaj perdas la instigon. Post sukcesa kurso ofte ĉio finiĝas.
- Pluraj bonaj agantoj komencis agadi en malgranda sed kohera amika rondo. Pli kaj pli da homoj ne plu estas kapteblaj per klubaj programoj. Ekzistas problemoj por kunvenigi homojn ĉar la socia vivo ankaŭ ŝanĝiĝis en la direkto de malgrandaj grupetoj. Ekzemploj : en trinkejoj oni antaŭe sidis ĉirkau unu granda tablo , babilante unu kun la alia, nun oni faras kvazaŭ fakojn kun tabloj por maksimume 4 personoj; ankaŭ en la sporto, teamsportoj perdas interesiĝon favore al individua sportado.

La ideo de tiu ronda vivo ne estas novaĵo. Ĝi ekzistis antaŭe, sed ĝi ankaŭ kelkfoje finiĝis kun malagrablaj spertoj, kun seniluziiĝoj.
Tamen tiu rondo povas sukcesi kondiĉe ke ĝi estas ligita al strukturo cele al eviti la samajn erarojn kaj seniluziiĝojn.

Sekvas pliaj klarigoj pri la reguloj :



- La informo pri starigo de rondo al la FEL-estraro celas al evito de "katastrofoj", ekz. tre entuziasma homo kiu apenaŭ parolas Esperanton kaj deziras formi konversacian rondon.
- Membroj de FEL : la rondo ne estu aparta grupo en la klubo. Povas esti homoj el diversaj Esperanto-grupoj.
- La iniciatinto devas mem klare difini la celon. Sen celo tio kondukos al klaĉado kaj seniluziiĝoj ĉe la aktivaj partoprenantoj.
- Ĉar bona kontakto tre gravas, la rondo ne estu granda. Verŝajne 10 personoj estas maksimumo.
- Aktiva partopreno de la rondanoj : homoj kiuj estas interesitaj sed ne volas aŭ povas aktive partopreni, "bremsas" la rondon.
Por eviti la pasivecon, ĉiu laŭvice gvidu la kunvenon kaj iniciatu la programon.
- "fermita rondo" : por eviti la ĉeeston de interesita persono kiu foje venas al la kunveno sed "rompas la ritmon".
- Ne enkonduku novan homon je propra iniciato, konsultu la aliajn homojn de la rondo.
- la raporto al FEL : precipe por sciigi ĉu la rondo ankoraŭ ekzistas.
- subskribo la regulojn : por atenti la regulojn kaj senti sin (psike) pli ligita.
- la rondo povas ankaŭ ekzisti por dinifita tempo, ekz. por prepari ampleksan programon, por specifa tasko kiu estos finita post difinita tempo.

Ĉu tiu koncepto de rondoj (kun reguloj kaj konsiloj) povas kontribui al la agado de Esperanto?
La ĉeestantoj opinias ke jes; donas celon al la lernado de Esperanto, disvastigo de la Esperanto-horizonto.

Post pli detala priparolo de la punktoj, la ĉeestantoj venis al la pli definitiva teksto kiun vi legis ĉi supre kaj aldonis la konsilojn.
Estis interkonsentite ke la reguloj restu dum kelka tempo senŝanĝaj; poste oni povas adapti ilin denove.

Posttagmeze sekvis ideopluvigo pri klubaj problemoj (agado, informado, financoj) en du grupoj gviditaj de Carl Deseure kaj MC sub konsiloj de Marc Vanden Bempt.
Ni publikigas la kompletan liston de ideoj aliloke.
La partoprenantoj surpaperigis unu aŭ du ideojn kiujn ili volas konkrete realigi kaj prikomentis siajn ideojn.
Por helpi la memoron, estos sendita post kelkaj monatoj karto al ĉiu persono kun demando pri la rezultoj de la persona listo.
La esenco estas ke ni instigu unu la alian por fari ion ĉar la forto por persisto mankas ĉe ni. Oni bezonas homojn kiuj instigas nin.

mc

---



*INFORMADO*

- fari tradukojn pri mia urbo (turismo)
- okupiĝi pri lingva diskriminacio
- informi pri la propedeŭta valoro de Esperanto sub formo de sloĝano : "Nova metodo por pli rapide lerni fremdlingvojn"
- konigi la taŭgecon de Esperanto
- publikigi informojn en gazeto de via entrepreno
- organizi interŝanĝojn intern. de lernejanoj kiuj lernis Esperanton
- instrui Esperanto-kantojn + poezietaĵojn al infanoj
- tatuado de la vorto esperanto en la haŭton
- Rob de Nijs k.a.
- sabaton matene veki la vilaĝanojn per laŭtparolilo, kiu vokas Esperanton
- karnavalĉaro Esperanto
- konigi Zamenhof kaj liajn ideojn al la publiko
- montri Esperantajn librojn al la publiko
- bazaristo
- skribi al informpetintoj
- gazetara agentejo (komenci)
- telefonnumero en oraj paperoj de gvidlibro R.T.T., kun respondaparato
- afiŝoj (mem glui)
- stando en librofoiro, infoborso, kultura centro
- sendi informojn pri Esperanto al aliaj lokaj grupoj
- kluba programo en loka gazeto, radio, TV
- intervjuo
- debato inter politikistoj pri Esperanto
- montrilo en komunuma domo (k.s.) al kunvenejo
- ekspozicioj
- libroj pri Esperanto en lokajn bibliotekojn
- viziti lernejojn : prelegoj, afiŝoj
- teatraĵo surstrata
- videble porti Esperanto-insignon
- uzi materialon kun surpreso "Esperanto"; perdi tion
- sin vesti verde
- Esperanto-glumarko sur aŭto, sur kapo, ....
- tuko "Esperanto" malantaŭ aviadilo
- flageto sur aŭtomobilo
- kurslibroj, informaj libroj en librovendejoj
- paroli Esperanton ekster la klubejo
- instrui kelkajn vortojn al kelnero en kutima trinkejo
- inviti urbestron por ke li aŭskultu Esperanton

## AGADO

- inviti la urbestron
- konigi Esperanton al konatuloj (ne-esperantistoj)
- sciigi la eventojn al la gazetaro
- informaj broŝuroj en alia lingvocentro
- eluzi la viziton de eksterlandaj Esperantoturistoj
- partopreni internaciajn Esperanto-renkontiĝojn
- partopreni en lokaj ne-Esperantistaj festoj
- inviti ne-esperantistojn al klubaj eventoj
- porti la verdan stelon
- partopreni en helpo je katastrofo
- helpo en aliaj landaj kampanjoj, eksterlandaj, interlandaj
- artikoloj pri kulturo
- korespondi en Esperanto kun eksterlandanoj
- internacia Esperantista karnavalgrupo
- marŝo al Bruselo - demonstracio antaŭ domo E.E.K.
- biciklokaravano tra Eŭropo
- anonci ĉe la domo ke "Mi parolas Esperanton"
- anonci ĉe Turisma Servo ke mi pretas gvidi Esperantistojn tra la urbo
- gastigi eksterlandajn esperantistojn
- organizi klubkunvenon en la parko
- organizi kongreson kaj inviti lokajn respondeculojn
- organizi lingvokursojn pere de Esperanto
- tekniko por pli bone lerni lingvojn
- disdoni informbroŝurojn en studenta restoracio
- organizi lingvokursojn gvidatan de eksterlanda Esperantisto
- zorgi ke mia esperanto-grupo bone funkcias
- fiksaj datoj, lokoj, programo
- informado pri kunvenoj al gazetaro
- kantvesperoj
- teatra vespero
- kvizo
- paroli pri Esperantolibroj
- tradukrondo
- superrigardo pri Esperanto-gazetaro
- koncizaj gramatikaj klarigoj
- lumbildoj
- vizitoj
- organizi vojaĝojn
- dialogoj antaŭpreparitaj
- kuirkunveno
- muzika vespero
- kunveni en publika loko
- organizi kursojn por pensiuloj, senlaboruloj, k.s.
- organizi kursojn en lernejoj dum ferio
- kultura broŝuro
- fari filmon
- triki, kroĉi, ....
- disdoni (malnovajn) Esperanto-revuojn
- inviti politikiston pri starpunkto de partio al Esperanto
- (serĉ)promenado, dulingva Esperanto/Nederlanda
- meti flagon sur Monto Blanka (Mont Blanc)



## FINANCOJ

- aliĝi al Kultura Konsilio
- servi trinkaĵon dum klubkunveno je trinkeja prezo
- servi manĝaĵon dum klubkunveno je trinkeja prezo
- enkasigi kotizon
- vendi gluetikedojn
- reklamo sur afiŝoj
- demandi helpon al firmaoj por patroni agadon
- reklamo en kluba revuo
- vendi kursojn
- vendi librojn
- partopreni en lokaj festoj
- organizi piknikon, balon, serĉpromenadon, tombolon
- subvenciojn peti
- organizi busekskursojn
- organizi vojaĝojn
- organizi boatekskursojn
- vendi folkloraĵojn el ekzotikaj landoj
- organizi internacian vendadon de bildstrioj
- vendi la garderobon de la prezidantino
- serĉi mecenojn
- kolekti mondonacojn inter la membroj
- mem donaci
- almozpeti
- kolekti kaj vendi uzitan paperon
- kolekti kaj vendi brokantaĵojn
- vendi vaflojn
- peri internacian privatan komercon (ekz. aŭtoj)
- kolbaskermeson
- vendi aŭtojn al alĝeranoj
- servo por orienteŭropaj pasportoj
- perado je aĉeto de eksterlandaj maloftaj studlibroj
- vendi malgrandajn arbojn je la "tago de arboplantado"
- vendi florojn
- lotludo (10.000 fr.)
- ŝteli monon
- vendi subtenkartojn
- trovi bonegan libroteniston (por bone koni kostojn/enspezojn de ĉiu aranĝo)
- organizi internacian feston
- organizi teatraĵon
- lavi aŭtojn
- fari profesiajn tradukojn (pagatajn)
- propra biblioteko por kiu oni pagas apartan kotizon
- doni kurson
- varbi membrojn, gardi ilin
- vendi asekurojn (agento)
- monpuno por krokodiloj
- fari libroservon
- vendi insignojn, glumarkojn, ...
- centralizi la organizadon, ekz. revuojn ... en unu Centron
- starigi komercan firmaon
- pliefikigi la uzon de volontuloj (dividon de taskoj)

## ENKETI PRI KLUBKUNVENOJ.

Petro De Smedt havigis aron de sugestoj por la studotago pri kluba agado, kiun ni pritraktis sabaton. Unu propono alvenis nur poste. Ankaŭ ĝi indas je via atento.

Li proponas konstantan kontrolon de tio, kion oni faras, anstataŭ memkontenton. "...mi faras tion plej ofte per telefonado al kelkaj, kaj prefere al tiuj pri kiuj mi scias ke ili ne facile estas kontentaj, kaj ankaŭ estas sufiĉe kuraĝaj por eldiri sian veran opinion."
Sed anstataŭe li proponas ĉe la fino de ĉiu kunveno anoniman enketon per kiu ĉiu ĉeestanto metu nombron inter 0 kaj 10 por esprimi sian (mal)kontenton pri la kunveno (0= mi bedaŭras ke mi ĉeestis). Kiu kuraĝas iniciati tion?

## LISTO DE KVALIFIKITAJ INSTRUISTOJ.

Post la studotago en februaro alvenis ankoraŭ longa listo de instruistoj, kiuj jam havis spertojn en diversaj Esperanto-kursoj. Jen do kompletigita listo:

Aerts Marcel, Alberto Manuel, Allewaert Jean-Pierre, Beckers Alfons, Beuseling Michel, Boon Albert, Budts René, Caestecker Monique, Claessen Albert, Declerck Chris, Dercksen Désirée, de Roover Rik, De Seure Carl, De Smedt Petro, De Sutter Lucien, De Vleminck Christiane, De Wolf Mariroza, Dossche Hugo, Durwael Ivo, Falk Hélène, Farber Mathieu, Haerick Patrick, Hanssen Jan, Humet Alex, Jacobs Ghislain, Lödör Katja, Raeymaekers Joris, Roose Fernand, Schelstraete Ludo, Staes André, Steenhout Raimond, Tytgat Kiki, Van Damme Emile, Vanden Bempt Marc, van der Biest Helga, Van Holder Ady, Vervaet Eric,

La listo estas surprize longa. Mi faras alvokon por konstante instigi unu la alian por informiĝi pri sukcesaj kursoj kaj por plibonigi sian instrukapablon. Mi ankaŭ petas vin instigi novajn kapablajn kursanojn por fari la neceson por fariĝi instruisto.
Renée Ost estas la unua kandidato por fariĝi kvalifikata instruisto de FEL laŭ la nova regularo.

I.D.

+ Jos Vandebergh + Iwona K.

## PASPORTOJ POR ORIENT-EŬROPO.

Eble inter viaj membroj, sed eĉ inter viaj ne-esperantistaj konatoj, iu volas viziti Orient-Eŭropon aŭ alian landon por kiu necesas pasporto. Nespertuloj supozeble perdas amason da tempo kaj multe da ŝvito por akiri tion. Iwona Kocieba pretas aranĝi ĉion por po 500 Fr. Tiu mono iom helpos al FEL. Sed pensante pri eventuala rondveturado kaj perdo da tempo, tiu sumo estas bagatelo por tia servo. Pri tio vi kontaktu ŝin (tel.: 03/218 63 76) aŭ ev. la Esperanto-centron.



## AGADO DE LA ESPERANTO-GRUPO "PACO & JUSTECO" - BRUGGE DUM 1988

Ĉi-sube ni skize konatigas nian agadon dum la pasinta jaro 1988.

**KURSOJ**: sep genovuloj regule sekvis la kurson por plenkreskuloj Krome kelkaj kursanoj de la antaŭa jaro ankaŭ ĉeestis.

Ni ankaŭ organizis kurson por gejunuloj kun bona rezulto.

**PRELEGOJ** : okazis interesaj prelegoj i.a. de S-ro VERSTRAETEN (mia unua legolibro); de S-ro ROOSE (datoj el la vivo de Zamenhof 2) la persono de Zamenhof kaj 3) pri iu ĝenerala historia temo); ankaŭ samideano el Tanzanio prelegis. Fine ni aŭdis s-ron LLOANCY pri "ĉirkaŭ la unua universala kongreso en Boulogne s/Mer en 1905"

**ORDINARAJ GRUPKUNVENOJ**: punktoj kiuj regule prezentiĝis dum la kunvenoj (ĉiam dum la 2a kaj 4a ĵaŭdoj de la monato) estis:
a) debatoj pri diversaj aktualaj temoj aŭ pri historiaj temoj b) paroladekzercoj c) tradukado de nuancplenaj vortoj d) solvo de enigmoj kaj e) pristudo de la Fundamento de Esperanto.

**GENERALA JARKUNVENO**: pro manko de kandidatoj la estraro konsentis daŭrigi la taskon dum plia jaro.

**GRAVA DECIDO**: nia grupo akceptis la aranĝon de la "Tago de la Amikeco" dum la jaro 1989.

**Ĉeesto de degrupanoj al aranĝoj de aliaj E°-grupoj**:
Ni sendis ambasadorojn al Gent, Oostende, Antwerpen, Brussel kaj Charleroi (fakte Cul des Sarts kie okazis piknikon).
Kelkaj gemembroj eble ankaŭ ĉeestis aliajn eksterurbajn kunvenojn sed ne avertis la estraron pri tio.
Kelkaj de niaj gemembroj kelkfoje ankaŭ ĉeestis aranĝojn de Ne-Esperantistaj grupoj kun la intenco propagandi la mondolingvo en tiuj medioj. Ni citas i.a; Ekspozicion rilate al "Homaj Rajtoj" en Wenduine je la 10/12/88; Ankaŭ grupa vizito al ekspozicio en la urba biblioteko de Brugge pri inkunabloj. Fine ankaŭ partoprenado de kelkaj degrupanoj al la aranĝoj de la "Breydel & De Coninck Commissie" en Brugge.

**FESTARANĜOJ**: 1. nia ĉiujara bankedo ĉirkaŭ la jarfino aŭ jarkomenciĝo kaj 2. promenado al turista am interesa loko je la fino de la laborjaro kaj antaŭ la komenciĝo de la ferioj.

**EKSKURSOJ**: 1) aŭtobusa ekskurso al vizitinda kastelo de Attres
2) aŭtobusa ekskurso al la "Ekspozicio pri Ĉinio' en la ĉefurbo.
Ambaŭ tiuj ekskursoj okazis en kunlaboro de la E°-grupo "La Konko" el Oostende.

********************

Ni invitas vin regali vin mem per

# Monato

unika, alternativa, ekskluziva
revuo en la internacia lingvo

pri politiko, ekonomio, kulturo kaj multaj aliaj temoj de la ĉiutaga vivo: revuo por la tuta familio.

MONATO havas 200 kunlaborantojn en pli ol 60 landoj, kiuj raportas originale en Esperanto.




Mendu provekzempleron
de MONATO ĉe
Flandra Esperanto-Ligo,
Frankrijklei 140,
B-2000 Antwerpen, Belgio.